# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 28/04/2022 Kvincentokdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 741,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **180,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **159,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **103,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022 ??)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la [esperanta retradio](#)



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

**FLUGROBOTOJ ANSTATAŬ ABELOJ? 19a Aprilo**



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 12 de "Por Progresantoj".**




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kion faras konjunkcio?
2), Kion faras subjunkcio?
3). Ĉu la konjunkcio aŭ la subjunkcio estas forlaseblaj?
4). Kiom da Esperantaj gramatikaj reguloj ne troviĝas en la dek-ses oficialaj gramatikaj reguloj?
5). Kiuj estas la dek-ses reguloj de la Esperanto gramatiko?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 580. *Marcel Leereveld.*

**Virusa atako** ..Vendredon la 23an de aprilo mi vidis retan reklamon por facile purigi la plankon per lavilo kaj blanka vinagro. Ĉar mi uzas blankan vinagron kontraŭ ŝimo, mi klakis la ligon por la demonstacio. Tuj la ekrano montris averton kaj urĝa voco kriis **Ne fermu! Ne fermu!** Do mi tuj fermis la komputilon. Mi malkonektis la interretan draton kaj provis la komputeron. La averto ankoraŭ estis videbla. Do mi telefonis miajn filojn kaj ili konsilis min iri al komputila reparisto. Mi iris tien sed la spertulo diris ke li estas tre okupita ĉar la tri taga semajnfino igis ĉion urĝa kaj li venos al mia domo je mardo. Mi konsentis kaj marde post mallonga ripara tempo kaj $150, la komputilo ree funkcias. Mi trovis ke mi povas vivi sen komputilo dum 4 tagoj.



Sed la novaĵletero kaj mi iomete suferis *Roger Springer*





## Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon. Ne la parlamento

Estas grava ke Aŭstralianoj scias ke Aŭstralio povus militi laŭ la kaprico de Ĉefministro. Pensu zorge antaŭ ol vi vocdonos ĉar milito ne estas la afero de aliaj landoj ĉar nun ekestas misiloj.

Nuntempe milito estas mond-detrua afero. Viaj impostoj nun mortigas homojn en la rusuja/usona milito en Ukrainujo. Ĉi tiu milito ŝanĝos la homan mondon *Roger Springer*

# Pesimismo erozias komercajn ligojn inter Ĉinujo kaj Aŭstralio




[GT Voice: Pessimism eroding China-Australia trade ties - Global Times]

La civitanoj de ambaŭ landoj suferos.
Ne batalu se vi ne povus venki
Fiero iras antaŭ la falo

Amike traktu iun, anstataŭ insulti iun amikiĝu

Reago al la artikolo publikigita en AE 579

## Ĉu Publike Posedataj, Planitaj Ekonomioj Funkcias?

Eble teorie ekonomio planita de la registaro povas garantii stabilecon al la lando. Tamen mi dum dek ok jaroj loĝis en lando , en kiu la decidoj pri ekonomio estis faritaj de la ministerio pri planado. Tie mi lernis kiel pacience vici por akiri ĉu ovojn ĉu rizon ĉu baterion. Mi ankaŭ lernis kiel elturniĝi kiam io mankas aŭ kiel ripari kiam io misfunkcias . La pozitiva flanko estas ke ĉiu havis la senton ke li/ŝi apartenas al komunumo ĉar ni vere bezonis interhelpon . Anstataŭ malŝpari la tempon kiel nun kontrolante la saĝan telefonon kaj la sociajn forumojn , ni malŝparis la tempon postkurante la ĉiutagajn necesaĵojn .

Anstataŭ uzi nur unu sistemon , pli bone estus se pluraj sistemoj estus uzataj samtempe tiel ke unu kompensu la malfortaĵojn de la aliaj . *Franciska Toubale*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

1). Oni uzas konjunkcion por kombini du malsamajn sed samfunkciajn elementojn gramatikajn, ekz. “Li TRINKAS BIERON kaj samtempe MANĜAS” kaj “Ne LI aŭ LIA FILO foriros”.
2). Subjunkcio ligas subordan elementon gramatikan al memstara elemento gramatika, ekz. “La patro sed NE LA FILO iris al la budaro” kaj “Ni renkontis la patron KUN SIA FIIO”.
3). Neniel en Esperanto.
4). Multaj, ekz. la regulo pri la kazo de la predikativo.
5). Vidu ilin en lernolibroj aŭ en kelkaj vortaroj. *Marcel Leereveld*



**3ZZZ** La elsendo de la 25a de aprilo traktas la problemon de plasto en la mondo kaj anoncas la publikadon de libroj akireblaj dum la kongreso en Montrealo



*Franciska Toubale*

En ĉi tiu sperta mensoga mondo , mi ĉiam provas sekvi la monon por eble trovi la veron. Ĉiam mi demandas min, kiu gajnas per la fia ago? Kaj ne ĉu homoj kapablis tiel fie agi. Fakte ni estas nur peonoj por la regantoj de nia ne perfekta mondo. *Roger Springer*